Vere, la pentekosta Esperantista fes- to jam pasis, kaj ni sopire rigardas al la fora estonteco por trovi la familian at- mosteron, la samideanan fervoron kaj kuraĝon kaj hardiĝon en nia senfina sed konsola batalo porpaca!

Kongresano

Postkongresa Komunikado

La XIII-a eniris la pasintecon! Res- tas al la Organiza Komitato, sincere dan- ki la sekciojn kaj reprezentantojn, ĉiujn partoprenintojn, kiuj per afablaj vortoj, gratuloj kaj kuraĝigaj prijuĝoj pruvis siajn simpatiojn kaj ŝaton.

La O.K. konscias ke sen ilia ĉeesto, bonvolo, fratiĝemo, ĝiaj klopodoj eĉ ne estus parte sukcesintaj krei koran inter- amikigan kongres-atmosferon. Dankon ankaŭ al la nederlandanoj, kiuj oportune aldonis internacian karakteron al nia landa kunveno. Tutspecialan dankon al la anglaj gastoj, ĝesinoroj *STUT- TARD*, kiuj, senlime sindonaj, montris kiel efektiviĝi kamaradecan spiriton.

Ĉu fine la O.K., kiu intencas kunme- ti memorigan kongres-albumeton, povas peti ke la kongresintoj havigu al sekcio *Blankenberge* interesajn fotojn pri la Kongreso? Anticipan dankon!

Kaj ĝis la XIV-a en *Gent*!

La Organiza Komitato.

LASTA LISTO DE ENSKRIBINTOJ.

- 81. S-ino W. E. P. GENESIS, Eindhoven, (Ned.); — 82. DHAENENS E., Oostende; — 83. S-ino M. DHAENENS, Oostende; — 84. DERCKX J.F.C.M., Bergen-op Zoom (Ned.); — 85. F-ino VAN SIELEGHEM I., Wendeine; — 86. F-ino SIMONIS Ph. M. A., Rotterdam (Ned.); — 87. F-ino VAN DEN BROECK E. M. P., Eindhoven (Ned.); — 88. DEBROUWERE G., Kortrijk; — 89. S-ino DEBROUWERE, Kortrijk; — 90. DE BROUWERE K., Kortrijk; — 91. F-ino DEBROUWERE L., Kortrijk; — 92. F-ino RETSIN G., Wendeine; — 93. F-ino WYDOODT A., Wendeine; — 94. VERCAMMEN L., Mechelen; — 95. S-ino O. VANNESTE, Oostende; — 96. VANTOURNHOUT W., Oostende; — 97. F-ino BALLIERE E., Oostende; — 98. F-ino PEETERS T., St. Gillis-Brussel; — 99. WOLTERS N. Almelo (Ned.); — 100. F-ino DE PRIL E., Wilrijk-Antwerpen; — 101. F-ino MAERTENS G., Assebroek; — 102. DE WINTER, Antwerpen; — 103. S-ino DE WINTER, Antwerpen; — 104. VANDERHAEGEN G., Gent; — 105. MORTELMANS, Gent; — 106. VANNESTE V., Gent; — 107. MOREL A., Gent; — 108. F-ino D'HAINAUT A., Gent; — 109. LINGIER E., Oostende; — 110. F-ino VAN RECHEM M., Zemmerzake; — 111. VERSTRAEL J., Den Haag (Ned.); — 112. F-ino SINTOBIN M., Lichtervelde; — 113. F-ino VAN LOOCK R., Lier; — 114. F-ino BERNAERTS A., Lier; — 115. PIOT F., Leuven; — 116. STRUBBE G., Blankenberge; — 117. F-ino POPELIER S., Blankenberge; — 118. MAKELBERGE E., Blankenberge; — 119. VERBRUGHE M., St. Kruis, Brugge; — 120. SAMYN P., Roeselare; — 121. F-ino RAMON, Brugge; — 122. NEIRINCKX, Aalst; — 123. TOUSSEYN C., Jabbeke.

Novajoj

Nieuwsjes

* *Tendumkomitato*: okaze de la 21-a SAT-Kongreso, la junulara Instanco de A.L.E. intencas organizi, la semajnon antaŭ ĝi, t.e. de la 24-a ĝis la 31-a de julio 1948, internacian junular-renkonti- ĝon en *Leersum* (Nederland), centro de naturbelajoj. Programo: ekskursoj, pro- menadoj, instruaj prelegoj. Kosto: 20 ned. guld. aŭ egalvaloraĵo. Informoj ĉe: Tendumkomitato, sekretario, H. Mit- tendorf Jr., Zeebrugedijk, 167, Amster- dam O. (Ned.)

* *Portugala Esperanto-Ligo*: Por eviti miskomprenojn pri sia starpunkto, P.E.L. komunikas ke « ĝi estas asociate supertendenco kaj bazigas sur la reci- proka respekto kaj toleremo de ideoj inter siaj geanoj, kiuj estas nepre egar- rajtaj... » « Ĝi angas al neniu el la nun ekzistantaj E-organizaĵoj, sed pretas kunlabori kun ĉiu el ili por krei tiamon- dan E-instancon, reprezentantan la tu- tan Esperantistaron ».

* *TJO, Internacia Junular-Kunveno en Groet* (Ned.): La I.J.K. estos organi- zata de la nederlanda sekcio *Groet* de la 3-a ĝis la 10-a-8-1948. Ĉiuj estas invita- taj: la situo de *Groet* meze de dunoj, apud la marbordo, la ekskursoj al *Alk- maar*, *Amsterdam*, *Volendam*, *Wadam* kaj la insuleto *Marken*, la interesa programo sendube montriĝos logaj! Detalaj infor- moj ĉe: Sro W. Bant, Wagemakersweg A. 154 a, *Groet* (Nederland).

* *TJO-DE: Denaska Esperantistaro* estis transprenita de *Tutmonda Junular-Organizo*; la sekretario, S-ino C. P. Weston, 27 Cecil Rd, *London-N.10*, An- glujo, plu funkcios en la kadro de TJO.

* *La Internacia Komerca Foiro de Budapeŝt*, kiu ankaŭ propagandas en Es- peranto, estis prokrastita de la 5-17 de majo ĝis 11-21 de junio 1948.

* En *Nordiska Kamrat-Tidningen*, or- gane de *Kamratringen* « kamaradorgani- zo de la nova tempo, kies membroj povas fariĝi kreskuloj kaj gejunuloj, kiu celas universalan(n) kamaradecan(n) per pe- sona kontakto inter ĉiuj antaŭencelantoj en ĉiuj landoj de la mondo », aperas an- kaŭ *Esperanto*-tekstoj.

La organizo disponas, por realigi siajn celojn leterservon, la diritan organon (presatan en pluraj lingvoj, i.a. en E) kaj prizorgas kamaradkunvenojn. La ja- ra kotizo estas unu dolaro aŭ egalvalora- ĵo. Adreso: *Kamratringen*, Box 721, *Stockholm*, I, Svedujo.

* *Chili*. Op het cursusprogramma 1948 van de *Universidad de Chile* komt in *Cursos Libres* voor onder nr. 106: *Inicia- cion al estudio del Esperanto* (Profs. Srs. René Garcia y Ambrosios Rabanales.).

* *Tcheco-slovakije*. Er verscheen over de stad *Kromeriz* een belangwekkend geïllustreerd prospectus in *Esperanto*, bi- zonder in verband met de viering van het honderdjarig bestaan van het plaat- selijk Parlement en de tentoonstelling die te dier gelegenheid wordt ingericht.

Alvoko por geinstruistoj!

La liganoj-geinstruistoj bonvolu tuĵ anonci sin ĉe la sekretario por la sta- rigo de *Flandra Komitato, paralele* al la *Valona Komitato, kiu celas la enkondu- kon de E. en la lernejoj. La valonaj sam- ideanoj afable petu informojn al Sro R. Lambert, rue du Prévôt, 2, Brussel.*

La Antverpena Stratpurigistino

Flandrujo, same kiel *Nederland*, estas fama pro la puremo de siaj loĝantoj. La nederlanda lingvo disponas ne malpli ol sepon da memstaraj vortoj, ebligantaj nuanci la eksteran purecon. Eĉ la baza vorto de la estetika konscio, «*beia*», es- tas uzata tiel por la aspekto de kolumo, kiel por tiu de pejzaĝo. (*) Sed la pu- reco de la stratoj bedaŭrinde neniam egalas tiun de la hejmoj...

esprimo, ke la edzo ne havas multan aŭtoritaton!

La lastaj «*purigaj sinjorinoj*» mala- peris antaŭ du jaroj post kiam ili, ne plu decaj en la moderna grandurbo, ek- funkciis malpli spektakle kiel purig- kaj senpolvig- istinoj enĉambraj...

«*Sic transit gloria mundi*». La sorto de la veturigistoj ne estis alla, ĉar ili sa- me malaperis antaŭ nelonge, tial ke la



(Nicaise de Keyser)

En la antaŭa jarcento la stratpuriga tasko fakte estis pli necesega ol nun pro la netaŭga pavimo kaj la monopo- lo de la... ĉevaloj. Tamen en *Antverpeno* kiel aliloke nur procedis pri ĝi, en la servo de entreprenisto (farmisto), la- boristoj, kelkfoje eĉ nebonfamaj, el la plej malriĉa tavolo de la loĝantaro.

Efektive tiu ŝajne malgrava tasko, nur plenumebla per mana laboro, ne estis loga en si mem kaj pro la hontigaj salaĵ- roj tiutempaj, ankaŭ ĉar intensa trafi- ko ne ankoraŭ malsekurigis la urbvo- jtojn, — rekrutigis por ĝi precipe mal- junuloj sed ankaŭ virinoj. La viroj ja neniam pridubis la purigan kompeten- tecon de siaj kunulinoj!

Nu, la antverpena humuro nomigis tiujn gelaboristojn laŭ la nomo de la entreprenisto, «*komizojn de Mintjens*», pro iliaj graciaj skribmovoj, kulminantaj en la «*punktoj*» kaj «*komoj*», kiujn ili per sia balailo firme premis kaj stre- kis sur la pavimon. Oni same promo- ciis la pompe disfloritajn purigistinojn per franca esprimo «*dames du ballet*» (balelistinoj) per facila vortludo laŭ la samsona «*balai*» (balailo). Eĉ fama ant- verpena pentristo *Nicaise de Keyser* (1813-1887) kiun inspiris ilia eleganteco, postlasis de unu el ili karakterizan de- segnaĵon. Li nome montras ŝin en kostu- mo kaj alta kapvesto de ĉirkaŭ 1850, kun eluzita balailo. La balailojn ili ja devis aĉeti proprakoste kaj la malpurecon de la stratoj kaŭzis — tion almenaŭ aser- tis de la burĝaro — la ŝparemo de la gepurigistoj!

Sufiĉe frue la progresema *Antverpeno* metis finon al la t.n. farmkontraktoj kaj starigis en 1862 aŭtonoman publi- kan purigan servon regie administratan. La regno de la virina elemento tamen plu daŭris. En la komenco de tiu ĉi jar- cento ŝi portis ankoraŭ blankan kufor kaj deposit la unua mondmilito nur... sian grizigintan hararon. Ĝis tiam ĉiu veturigisto en la ne ankoraŭ reorganizita kolekto de mastruma malpuraĵo estis akompanata de sia «*sinjorino*», kiu hel- pis lin, purigis ankaŭ la stratojn kaj... sorbrinkis tasojn da kafo sur la sojlo de simpatiantaj dommastrinoj. Sed en tempo de virina emancipado ili iom post iom lasis la balailon sur la strato al la viro kaj metis la sian hejme «*malan- taŭ la pordon*», kio aludas, laŭ la *flandra*

lastaj ĉevaloj iris la vojon de ĉiu karno.

Tiel la moderna progreso faligas vik- timojn. La purigado de la grandaj ur- boj eniris definitive science teknikan fazon en kiu la higienistoj kaj la in- ĝenieroj diros la decidan vorton.

Hector Vermuyten

(*) Cfr. J. Huizinga, — *Nederland's geestesmerk*.

DE PERS OVER ESPERANTO

Hieronder beknopt wat we over Es- peranto vonden in de dag- en weekbla- den gedurende de verlopen maand April 1948.

Een mededeling betreffende de K.L.M. die Esperanto gebruikt, werd gepubli- ceerd door «*Het Laatste Nieuws*» (27. 4) — «*De Nieuwe Gazet*» (28.4) — «*De Gentenaar*» (29.4) — «*Het Nieuws- blad*» en «*De Standaard*» (30.4). Zelf- de bladen en ook «*Het Nieuws van den Dag*» (14.4) gaven een mededeling no- pens Esperanto ten dienste der wereldli- teratuur. Op 20.4 geven «*Het Nieuws van den Dag*» en «*De Gentenaar*» een berichtje nopens de Britse Esperantisti- sche vereniging. Afzonderlijk noteerden we nog «*Het Handelsblad*» — «*De Zweep*» — «*De Unie*» Brussel — «*t Vrije Volksblad*», elk met een verschil- lend bericht over Esperanto bedrijvig- heid. Ten slotte nam «*De Gentenaar*» een volledig artikel over uit «*Flandra Esperantisto*» nl. «*Minister Naegelen over de wenselijkheid van een interna- tionale taal*». «*De Zondagochtend*» pu- bliceerde op 16.4 weer een interessante Esperanto-kroniek en in het Aprilnum- mer van «*De Trekker*» verschenen zelfs 2 artikels nopens Esperanto. Vermelden wij nog het advertentieblad «*De Bei- aard*» Brugge dat om de week over Es- peranto schreef. Voor wat de franstalige pers betreft noteerden wij «*Le Soir*» met 7 mededelingen, «*La Libre Belgique*» met 2, «*La Lanterne*», «*La Meuse*», «*L'Indépendance*», «*Avenir du Luxembourg*», «*La Dernière Heure*», «*Le Drapeau Rouge*», «*Le Matin*», «*Le Peuple*» en «*Les Nouvelles du Con- droz*», elk met een bericht. Voor het grootste deel zijn het aankondigingen van kongressen of vergaderingen. Het laatstvermelde blad maakt uitzonde- ring met een zeer uitgebreid artikel ge- titeld «*A propos de l'Esperanto — Evo- lution des langues*».

Samenvattend werd Esperanto 40 maal vermeld, 't zij 22 mededelingen in Ne- derlandstalige en 18 in franstalige dag- en weekbladen.

Plaatselijk Nieuws

V.E.B. Afdeling Antwerpen: Gewone afwikkeling van het voorziene programma, waaronder nochtans speciaal dient gememoreerd de spreekbeurt van Mej. Hofkens H. over F. Timmermans (10.5.48): spreekster bracht ons interessante beschouwingen over het leven van de auteur van *Pallietier* en gaf lezing van kenschetsende fragmenten uit zijn werk. Het programma van Juni werd als volgt vastgesteld: 7.6. Parolado Sro *Cortvriendt*; 14.6. Raporto pri la landa kongreso; 21.6. Kantvespero; 28.6. Ekzerca vespero.

V.E.B. Afdeling Brugge: Op 15.4.48 sprak onze ijverige propagandist, Gr. Maertens, over de propaganda binnen en buiten de afdeling, waarna aan grammaticale oefeningen werd gedaan. Op 17.4 woonden twee onzer leden het geslaagde feestje van afdeling Brussel bij. Op 18.4 werd de propaganda ingezet door het uitreiken van 1000 strooibriefjes met allerlei mededelingen over *Esperanto*. Op 22.4 werd een werkvergadering gehouden: grammatica, enigmojen en allerlei nieuwsjes uit de E. wereld. Op 29.4, kantvespero. Op 6.5 greep een gezellige bijeenkomst plaats.

V.E.B. Afdeling Mechelen: Regelmatige vergaderingen, waarop aangedrongen werd op de Amiko-verbod, de studie van *La Verda Koro* werd voortgezet en een begin werd gemaakt met de vertaling van een hoofdstuk uit *De Witte* van E. Claes.

Op 25.5.48, bracht dhr Willems, afdelingssecretaris verslag uit over het Kongres te Blankenberge, de afwerking van een hoofdstuk uit «De Witte» van Ernest Claes werd gepland voor het Juli-nummer F.E.L.

Niaj Esperanto-Enigmojen kun premioj

PREMION gajnis post n-roj 39-40: s-ro F. Roose, el Brugge.

Bonvolu noti, ke estonte la gajninto povos mem elekti sian premion (gis valoro de 50 fr.) inter la libroj livereblaj ĉe Flandra Esp. Instituto.

SOLVOJ.

N-ro 41. ŝelko, tilio, radio, placo, anaso, pasko, azeno, mangi, folio, punto, ekipi, avara, klaso, aveno, ŝpari, violo, pilko, atomo, klara, trabo, apogi.

Kia la semo, tia la rikolto. (Pr. 391).

N-ro 42. Horizontale 9 estis erare prezentata en la krado. Ĝi aspektu tia:

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□

La solvo estos akceptata gis 20.6.1948.

N-ro 43. KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. Fiŝoj vivas en ĝi (R); membro. — 2. egale kiel aliaj. — 3. prefikso; povanta okazi (R). — 4. antaŭaranga konkuro laŭ difinitaj reguloj (R). — 5. prepozicio; mezuri la kvanton de iu medikamento (R); teksaĵo (R). — 6. persona pronomo; parto de domo (R). — 7. ĝi estas inter violono kaj violonĉelo (R); legomo kun manĝebla radikoj (R); kovri per alĝustigita tukoj, ekz. fotelon (R). — 8. advoki al supera tribunalo (R). — 9. tute senvalora (R); pronomo. — 10. interpunkcia signo (R). — 11. birdo (R); ripete kaj rapide svingi tien kaj reen (R).

Vertikale. 1. ĝi troviĝas ĉe komenco de letero (R); arbo (R). — 2. malsama (R); aktoro devas lerni ĝin (R); per ili oni povas grati (R). — 3. kaŭzi indignon al iu pro malbonekzemplaj agoj (R). — 5. subakvigis (R); tute certe. — 6. hele ruĝa materio el kiu oni faras juvelojn (R). — 7. sentanta maltrankvilon pri la fideleco de amata persono (R); arbo en varmaj landoj. — 9. konforma al la sento de la belo (R). — 10. ĝi ŝvebas en la aero (R); ŝmirajo (R); ĝi estas bezonata por skribi (R). — 11. dormigi (R); per ĝi oni levas pezajn objektojn (R).

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
2	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
3	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
4	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
5	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
6	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
7	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
8	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
9	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
10	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
11	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□

N-ro 44: SEKRETA SKRIBO. Anstataŭigite la uzitajn literojn per la ĝustaj, vi trovos poemon.

Cezif fanula ri dilni fel doĵ lavuki dimhuka cezif ri domkla nirdilni um doi dimhlimpi caluka. Koa so wirpij fom zimtaf ga, noi cili kluvala domkla fom kladaf fel dimhay fanula ri dilni um cala.

Sendu la solvojn sur aparta folio al POSTBUS 342, BRUSSELS, antaŭ la 20.6.1948.

ANONCETOJ

Ĉiu vorto aŭ mallongigo: 0,75 bfr. Enpresigo kosta minimume 15 bfr. Unu int. respondkupono valoras 3 bfr.

Jus aperis bela slovak- kaj esperantlingva prospekto pri urbo Trencin. Gesamideanoj, vi ricevos ĝin senpage, poŝt-revene, se vi petos ĝin de: Slovaka-tour, loka grupo por vojaĝtrafiko, Trencin, CSR-Slovakujo.

Libertempado en verdstela rondo. Faka pionirado por libertempaj aferoj: Samcelanoj, skribu al EKO-centro Karlo Karger, (16) Driedof-Dillkreis, Germanio, USA-zono, aldonante afranko-rekompenco. La filatelista EKO-representantoj estas komisiotaj! Petu prospektojn!

Tutmonda Junulara Organizo, rondo ĉe Sniadecki Gimnazio, Pabianice, Partyzancka 56, Polujo, organizas grandan Esperanto-Ekspozicion en junio-julio 1948. Sendu amase ĉian propagandan materialon, kiu estos, se tio estas dezirata, resendita.

Dana karavano! aŭtobuso de 27 geesperantistoj iros de 2-13. de julio al Nederlando, Belgiujo kaj Parizo. Interŝanĝo de monservo tre deziras la karavangvidanto: S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhoj Danlando.

Abonu la internacian monaton revuon «Espero Katolika»: ĝi estas la plej bona, malnova kaj legata katolika Esperanto-revuo. Pagu la jaran kotizon de 50 fr. per poŝtĉekkonto n° 4217.34 de A. BECKERS, Overpelt-Fabriek.



Postbus 342, Brusel
LEIDING: Dr. T. Van Gindertaelen. (Mechelen).
REDACTIELEDEN:
Dr. Couwenberg (Blankenberge) — Drs. F. Roose (Brugge) — Drs. E. Symoens (Elisabethstad) — F. C. Ridwit (Antwerpen) — H. Vermuyten (Antwerpen) — E. Cortvriendt (Brussel) — Gr. Maertens (Brugge) — Verda. — F. Piot (Leuven).
KOPIJ: Uiterlijk de 15-de van de maand bij de Redactie!

Cerri-Esperanto-Servo

SOLIDARECU

kun samideano malsanigita de sururbaj bombardadoj!

Li anoncas proksiman aperon de

Libro por korespondemuloj

Luksa aspekto — Malgranda 16° formato — Utilega dum tutjaro-Inklinaj kaj profesiaj adreslistoj.

Esperanto-Entreprenejoj — E.-Grupoj — Korespondemul(in)oj — Junuloj kaj skoltoj tuj

ENPRESU ANONCETON

Vi ricevos senpage unu ekzempleron!!!

Dulinia anonceto (90 signoj aŭ spacoj). prk.7 — Pliaj linioj (45 signoj aŭ spacoj), po prk.3.

Prezo de unu ekzemplero post apero, prk. 6

Perantoj dezirataj: ili rajtas rabaton! Adreso:

CORRADO CERRI, Ins., Dro

Cerri-Esperanto-Servo

Casella Postale, 89 Varese (Italiujo)

La sama servo krome:
1) kolektas ĉiujn opiniojn de Eminentuloj el ĉiuj landoj, opiniojn pri E.!
Direktu vin al ĝi por akiri la necesajn informojn.
2) serĉas ĉiujn interesatojn pri Homeopatio: ĉiuj koncernatoj estas petataj direkti sin al la dirita servo, por pere de Esperanto akiri seriozan kaj gravan enketon!

DEVENO & VIVO

DE LA LINGVO ESPERANTO

originale verkis: Petro Stojan

7.
Tia heredado, konsciata aŭ senkonscia, normale aperas ĉe la grandaj inventintoj & eltrovistoj. La eltrovo de Ameriko okazis ĉe la fino de la ĉeno, kiun komencis Fenicioj (Kartagenanoj), daŭrigis la aŭtoroj de la Atlantida legendo, kaj la vojaĝo de Erik(skandinaviano) kvar jarcentojn antaŭ Koumbo. La astronomia graviteco, matematike pruvita de Newton, estis nur la fino de la ĉeno, kiun komencis antikvaj ĉiel esploristoj, daŭrigis Kopernik, Brahe, Keplero & finpretigis Hook, samtempano de Newton. Nesciencaj libretoj pri Esperanto-deveno montras la genecon de Zamenhof en tio, ke li unua & sola kreis la mondlingvon. Nun ni vidas, male, ke la grundo por mondlingvo estis jam preta 20-30 jarojn antaŭ li, ke la spirita heredado okazis ĉe li same normale kiel ĉe antaŭaj aŭtoroj.

Tiel ni konstatas, ke la idea ĉeno intime kunligis ĉiujn nomitajn pensulojn de Lull ĝis Leibniz & de Leibniz ĝis Zamenhof, kvazaŭ idojn, generacie sinsekvantajn, en unu granda dinastio de la regno idea. Ĉiam retroen irante ni trovas sammaniere ke Lull heredis el la filozotio de Plato, ke Plato heredis el la Pitagorismo, kiu siavice heredis el Hinda & Zenda alt-scienco, produkto de la blank-rasa spirito... naskita en virg-arbaroj de Dono, Dniepro, Niemeno... Zamenhof do fermis la grandan ciklon de la prahistoria civilizacio — en la sama regiono kie ĝi pratempe elgermis. La mistera mita serpento «Uroboro» mordis sian voston.

DUA PARTO

ZAMENHOFA LINGVO

En decembro 1878 la deknaŭjara liceano L. L. Zamenhof festis, kun siaj samklasanoj, la naskiĝon de la «Lingvo Universala», kies specimeno famiĝis dank' al la Zamenhofa letero al N. Borovko (Odessa), publikita nur en 1896:

«Malamikete de las nacjes kado, kado, jam temp esta,

La tot homoze in familje komunigare so deba».
(Malamikete de la nacioj falu, falu... tuta homaro unuigi devas).

En 1937 la lituva pastro Dombrovski (esperantisto de 1887) ricevis de la familio Zamenhof detal-memorajojn pri la unua tempo, inter kiuj estas atentinda la sciigo, ke la patro de Zamenhof estis kontraŭ la mondlingva laboro de sia filo, kies kajarojn li kolere detruadis... Sed la filo, obstina & pacienca, denove skribis alian kajeron, kiu post kelkaj monatoj ree estis detruata de la patro, kaj la filo denove rekomencadis. Admirinda favoro de la sorto kiu tiel igis la junan Zamenhof ĉiam pli kaj pli perfektigi la lingvon, jam en la proceso de la cerba rememorado & refoje skribado, neeviteble kun plibonigoj!

Dum la student-jaroj, en Moskvo, la juna Zamenhof daŭrigis, en liber-horoj, la konstruadon de sia lingvo, kies resumo troviĝis en la kajero titolita: «Lingvo Universala, t.e. grammatiko e verbioso laul trema redakto del anno 1881». En ĝi la ruslingva grammatiko jam proksimiĝas al tiu, kiu aperos en 1887. Jen la specimeno: «Mo bella princino il sonto vida' ko z'uojs malses'aj e palaj, sul dillo, sul verda no koe sida' il armoj amizaj e kalaj...»

Depost 1879, pro la mokado de la kamaradoj, la juna

studento Zamenhof laboris kaŝe, al neniu konfesante sian mondlingvan laboron, kaj tiu kaŝado suferigis lian solecan animon, kiu havis ja naturan bezonon je geamikado, sur la idea bazo. Tial, en societo li sin sentis ree sola, izola, kaj li baldaŭ reiradis hejmen, kie — en poezietoj — li elverŝadis siajn malgajajn sentojn & revojn. Jen unu el tiaj versupecoj, verkitaj inter 1883 & 1885:

«Mia penso kaj turmento,
kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
al vi iris jam oferoj!
Kion havis mi plej karan
— la jenecon — mi ploranta
metis mem sur la altaron
de la devo ordonanta!
Fajron sentas mi interne,
vivi ankaŭ mi deziras.
io pelas min eterne,
se mi al gajuloj iras...
Se ne plaĉas al la sorto
mia peno kaj laboro —
venu tuj al mi la morto,
en espero — sen doloro!»

Pri la grava tempo 1879 — 1885 li mem skribis al Borovko: «Dum ses jaroj mi laboris, perfektigante kaj provante la lingvon — kaj mi havis sufiĉe da laboro, kvankam en la jaro 1878 al mi jam ŝajnis, ke la lingvo estas tute preta. Mi multe tradukadis en mian lingvon, skribis en ĝi verkojn originalajn, kaj vastaj provoj montris al mi, ke tio, kio ŝajnis al mi tute preta teorie, estis ankoraŭ ne preta praktike. Multon mi devis ĉirkaŭhaki, anstataŭigi, korekti kaj radikale transformi... Ankoraŭ unu ĉirkonstanco igis min prokrasti mian publikan eliron kun la lingvo... la neŭtrala lingvo ne povos havi estontecon ĝis tiam, kiam ĝia utileco fariĝos por ĉiu aparta persono sendependa de tio, ĉu la lingvo jam estas akceptita de la mondo aŭ ne. Pri tiu problemo mi longe pensadis. Fine la sekretaj alfabetoj... kondukis min al la penso aranĝi ankaŭ mian lingvon en maniero de «ŝlosilo», kiu — enhavante en si la tutan vortaron... kaj ankaŭ la tutan grammatikon en la formo de apartaj... elementoj, alfabeto ordigitaj... kio donus la eblon eĉ al nelerninta persono tuj kompreni ia esperanto-leteron... Mi finis la universitaton, kaj komencis mian medicinan praktikon... tiam mi ekpensis pri la publika eliro...»

Nun, post la sciigo, venintaj de la Zamenhofa familio, akorde kun liaj malnovaj leteroj, ni scias ke la manuskripto de la «Unua Libro» estis preta jam en 1885. Dum du jaroj Zamenhof vane serĉis eldoniston. En 1887 li edziĝis kun fraŭlino Klara Zibernik, kaj ŝia patro — favora al la mondlingvo — helpis sian bofilon per konsilo & per mono. Tiel povis aperi en 1887 la unua lernolibro. Dum du jaroj, kiuj sekvis, ĝis la fino de 1889, li elspezis tutan sian disponeblan monon por eldoni dekon da libretoj en kaj pri Esperanto, dissendi parton de ili senpage, kaj pagi gazet-anoncojn. Jen, tradukita peco el tia anonco, presita en la rusa

semajna ilustrita revuo «Niva» (novembro 1888): «Tutmonda Lingvo Esperanto. — Depost plej antikva tempo la tuthomara lingvo estas la amata ideo de revantaj idealistoj. Do ni ne parolis pri la grandega rolo, kiun povus ludi por la homaro la adopto de unu komuna internacia lingvo. Kiu eĉ unufoje pripensis tiun ĉi ideon, tiu certe konsentos ke neniam otero devus nin timigi, kondiĉe ke per ĝi ni povus atingi la tutmondan lingvon, kaj ke estas ĉies devo — laŭeble helpi al la realigo de tiu tradicia revo de la homaro. Lingvo Internacia, proponita de D-ro Esperanto, estis publikigita je la fino de 1887, kaj en mallonga tempo altiris multajn adeptojn, kies nombro kreskas ĉiuhore. Tiu lingvo estas tre belsona, treege facila, kaj permesas interkompreniĝi al iu ajn nacio. Pri tiu lingvo Esperantista nun estas proponata la TUTMONDA VOĈDONADO, en kiu povas partopreni ĉiu. Ju pli multaj personoj pri tio voĉdonas, des pli rapide efektiviĝos la tradicia sankta revo de la homaro...» (— Poste la anonco parolis pri la lernolibroj & legolibroj aĉeteblaj ĉe la aŭtoro: D-ro L. L. Zamenhof, Przejad 9, Varŝava.)

Tiu grandspaca anonco en 50 linioj, aperinta dufoje en la populara semajna revuo kun 100.000 abonantoj kaj almenaŭ 500.000 legantoj, havis la fortan efikon: ĝi altiris milojn da rusoj & da ruslingvanoj, kaj formis la unuan generacion de la Esperantistoj, kiuj tuj ellernis & ekuzis la novan lingvon.

Je la fino de 1888, en la «Aldono al la Dua Libro» (verkita nur en Esperanto) la aŭtoro invitas slajn adeptojn al la komuna laboro por Esperanto, ne atendante ke iu internacia sciencul-kongreso esploros, plibonigos, aŭ sankciigos la lingvon... ĉar eble tia kongreso neniam efektiviĝos. Poste Zamenhof daŭrigas jene:

«Por ke la lingvo povu regule, unuforme kaj unuvoje progresadi malgraŭ la disjetita laboro de malsamaj personoj en malsamaj lokoj de la tuta mondo, oni devas krei komunan fundamenton... (kiu estu) mia unua libro, kiu havas en si la tutan grammatikon kaj sufiĉe grandan nombron da vortoj... Cio cetera devas esti kreata de la homa societo... Se ia vorto ne estas trovata en la vortaro kiun mi eldonis, kaj oni ĝin ne povas fari mem laŭ la reguloj de la vortfarado... tiam ĉiu povas krei tiun vorton laŭ sia persona plaĉo... Mia rolo nun estas finita, kaj mia persono tute foriras de la sceno... Ĉion, kion mi de nun faros aŭ skribos, mi ĝin ĉion faros jam kiel simpla privata amiko de la lingvo internacia, havante nek pli da kompetenteco, nek pli da moralaj aŭ materiaj privilegioj, ol ĉiu alia. La verkoj, kiujn mi eldonos persone, ne devas havi pli da kompetenteco ol la verkoj de ĉiu alia... tion postulas la interesoj de la afero (esperanta), kiu alie ne povus regule kaj rapide vastiĝi kaj ĉiam estus en dependo de unu persono kun liaj eraroj.»

Tiu stranga deklaro devus nin mirigi, se ni ne komprenus ĝin kiel momentan malfortecon, sekvon de troa cerba laboro & nerva streĉo de la lastaj du jaroj. Aldoniĝis krome la malsukceso de la tutmonda voĉdonado, organizita de Zamenhof jene. Ĉiu aĉetanto de lia «Unua Libro» 1887 — (prezo 65 centimoj, afrankite) havis, kiel adepto, la rajton voĉdoni por la tutmonda adopto de la lingvo.

(Daŭrigota)

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond, Postbus 342, Brussel. — Drukkerij: J. Van Laer, Oude Vaartstraat 110, Turnhout